# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 316 (82) KVINA EPOKO MAJO-JUNIO 2001




ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO — KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

**Apartat, 290 - 08200 - SABADELL**
**CATALUNYA - KATALUNIO**

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785
Kolektiva membro de Literatura Foiro Kooperativo
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj *Esperanto*, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo *Monato* kaj libroj), IKEL, *Literatùra Foiro, Heroldo, La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Litova Stelo, Scienca Revuo* (ni peras ankaŭ aliajn revuojn)

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental) Catalunya/Katalunio Tel + Fakso: 93-716 36 33, (ekde lundo ĝis vendredo inter la 17a kaj 20 h.)

**Ret – adreso**: kea@stel.net
**Ret – paĝo**: http://www.stel.net/esperanto/kea
**Kotizoj por la jaro 2001**: Individua Abonanta Membro 3.500 p-toj; Individua Subtenanta Membro 7.000 p-toj; Individua Dumviva Membro 70.000 p-toj; Kolektiva Membro 7.000 p-toj; Juna Membro 2.500 p-toj.

**Banko**: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona – Agència 461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

**Plenumkomitato de KEA**: Prezidanto: Neus Moly; vicprezidanto: Josep Franquesa; kasisto kaj provizora sekretario: Llibert Puig; komitatanoj: Mercè Porta, Roger Prieto, Anna Casasús.

**Kontrola Komisiono:** Miquel A.Altuna, Arnald Massanas, Lluís Armadans.

**Kataluna Esperantisto:** Llibert Puig, Marina Ollé. Revizianto: Hèctor Alòs i Font.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

**Kataluna Esperanto-Junularo**: Apartat 32.318 - 08080 Barcelona
**Imprès a/Presita ĉe**: Prest Graf. Sabadell. Tel. 93 725 50 91
**Dipòsit Legal:** B-27362 - 1982

**Ni aperigas frontpaĝe la belan afiŝon de la nuna grupo Majorka Esperantistaro, kiu baziĝas sur afiŝo de la KEF-Kongreso okazinta en Palma je 1925.**

## KONGRESA INFORMILO


Jen finfine la aliĝilo ĉi-kunas. Nepre atentu, ke la unua periodo finiĝas fine de julio. Mendante la tranoktadon en hoteloj, nepre petu konfirmon de la prezo, tamen ni konsultis la ĉi-jaran oficialan prezliston de nia kataluna registaro. Ni anoncis nur kelkajn diversprezajn hotelojn, sed ekzistas ankaŭ aliaj ne anoncitaj (se tiuj anoncitaj plenas konsultu nin telefone aŭ rete kaj ni rekomendos aliajn samprezajn hotelojn).

Dum la Literatura Mateno prelegos la konata sveda verkisto kaj gvidanto de la eldonejo Al-fab-et-o Sten Johansson. Lin prezentos nia kara amiko, mem verkisto, Manuel de Seabra.

## POR LA PACO, NE AL MILITA DEFILADO


La libro 104-paĝa en formato DIN A4, kies frontpaĝon ni reproduktas, estas kvarlingva (kataluna, hispana, angla kaj esperanta) klarigo pri la agadoj de la movado kontraŭ la milita defilado en Barcelono dum majo 2000. Ĝin eldonis sufiĉe vasta (kaj grava!) kontraŭdefilada anaro kuniganta ducenton da asocioj. La libro ne celas, ke oni kunĝoju pri la sukceso de la mobilizado, sed ke ĝi helpu en aliaj lokoj starigi similajn agadojn.

Nia asocio jam komencis distribui ĝin al diverslandaj E-asocioj, kun kiuj ni havas interŝanĝajn rilatojn.



**MAJORKO**

La grupo *Majorka Esperantistaro* informas nin pri sia TTT-ejo http://majorka.8m.com/main.html. Frontpaĝe aperas tre bela tutkolora afiŝo, kiu bonvenigas nin kaj sekvas raportoj pri du temoj, kies graveco rekomendas reprodukti ilin ĉi-sekve.



**Historia tezo**

La pasintan 30an de marto 2001 estis legata en la Universitato de la Balearaj Insuloj (Universitat de les Illes Balears) la doktoriĝa tezo 979-paĝa "Esperantista movado en Majorko, 1898-1938" verkita de Xavier Margais i Basi.

Konsistigis la tribunalon D-ro J. M. Santandreu Soler el la Universitato de Alakanto; D-ro J. A. Ferrer Benimeli el la Universitato de Zaragozo; D-rino Isabel Moll Blanes kaj D-ro Sebastià Serra Busquets, ambaŭ el la Universitato de la Balearaj Insuloj. La prezidanto estis D-ro Joan Mas i Vives el la sama universitato.

Ili donis al la tezo la maksimuman kvalifikon, kiun oni povas doni en la universitato: *Cum Laude*.

La tezo havas kvar partojn:

1. Praesperantismo.

Alportadoj de lingvistikaj projektoj, kie partoprenis katalun-lingvanoj; lingvistika idearo kaj sociaj proponoj de pluraj aŭtoroj, kies verkoj influis majorkanojn, laŭ socia kaj historia vidpunkto. Naskiĝo de la esperanta movado kaj ĝia influo en okcidenteŭropaj landoj.

2. Esperantismo en Majorko 1898-1918

Enirvojoj al Majorko de nia movado. Organizado de Esperantista Klubo Palma. Kulturaj aktivaĵoj, kongresoj, floraj ludoj ktp.

3. Esperanto en Majorko 1919-1938

Kreskado de la esperantismo en Majorko, en kiu partoprenis pluraj asocioj. Kulturaj aktivaĵoj. Detruado de la esperanto-movado fare de la hispana faŝisma armeo.

4. Kelkaj biografioj de esperantistoj. Inter aliaj, tiuj de Miquel Arbona, Joan Mascaró kaj Bartomeu Font.

La aspektoj plej elstarigitaj de la tribunalo estas:

-La vasteco kaj detalemo de la verko.

-La rigora metodologio.

-La originaleco de la temo, ĉar ne ekzistas en la hispana teritorio alia tezo pri la esperantisma movado.

-La kvanto da fontoj konsultitaj (parola historio, publikaj kaj privataj arkivoj, bibliotekoj, ĵurnaloj ktp)

-La malfacileco trovi sufiĉe multajn informojn kaj dokumentojn ĉar ili estis grandnombre bruligitaj aŭ detruitaj dum la hispana milito (1936-1939).

-La fakto, ke la temo estas ektraktata laŭ historia vidpunkto, sed pri esperanto kutime oni parolas prefere laŭ lingva vidpunkto.

-Ke tiu laboro utilas por reakiri historian memoron pri personoj kiuj batalis por siaj idealoj.

-Ke en tiu tezo estas cititaj multaj personoj, kies nomo estas vere fama en kultura medio de Katalunlandaro, sed de ne kutima perspektivo.

Ni esperas vidi tiun verkon baldaŭ eldonita kaj ni ŝatus, ke ĝi servu por kuraĝigi aliajn gravajn esploradojn pri tio, kion signifis la esperanta movado en aliaj partoj de la mondo.

**Respublikisma omaĝo**

La pasintan 14an de aprilo, 70a datreveno de la Dua Respubliko, organizite de la loka maldekstrularo Ales, okazis en la tombejo de la vilaĝo Santa Maria del Camí [kamí] omaĝo al la lokaj respublikanoj murditaj de la faŝistoj dum la militribelado okazinta en la jaro 1936. En ĉi tiu kadro, pluraj membroj de

# NIA AGADO

Majorka Esperantistaro partoprenis en la omaĝo kaj ankaŭ rememoris majorkajn esperantistojn, kiuj ankaŭ estis murditaj de la faŝistoj kaj ofertis, en esperanta lingvo, informojn al la ĉeestantoj pri niaj martiroj. Ĉi tiuj flugfolioj estis ŝpareme prenitaj de la partoprenantoj, dum nia samideano kaj doktoro pri historio Xavier Margais prelegis mallonge kaj katalune al la tuta respublikanaro.

En la numero 458, de la majorka duonmonata revuo *L'Estel* oni multe informas pri la Respublika Tago, kaj ankaŭ pri tiu evento, same kiel en la loka revuo *Coanegra* [koanegra], menciante kaj rimarkante la partoprenon de esperantistoj, kaj la fakto, ke esperanta flago prezidis la eventon, kune kun la trikolora respublikisma.

En *L'Estel* oni povas legi longan artikolon "Santa Maria del Camí: commemoració dels 70 anys de la República":

"...parlaren de la repressió feixista contra els membres d'aquest important moviment cultural represaliat pel feixisme. La bandera dels esperantistes –juntament amb la de la República– presidí l'acte..."

Jen la teksto de la flugfolio, kiun ni disdonis:

RESPUBLIKA TAGO

Hodiaŭ, la 14an de aprilo, anoj de Katalunlandaro festas la Respublikan Tagon. Ni volonte rememoras ĉi tiun tagon, ĉar en ĝi kuŝas simbole nia amo al la libereco, frateco kaj egaleco. Ankaŭ ni rememoras samideanojn murditajn kaj persekutitajn de la hispanaj faŝistoj. Ili estis malamitaj, ĉar vivis laŭ respublikanaj moro kaj pensmaniero.

Vidu malgrandan biografion de batalintoj por la respublikana idearo.

*Antoni Coll Sastre* (Palma 1892-1937). Alkohola industriisto. Li havis plurajn interesojn, fondis la *Lliga Laica* kaj estis ano de *Ateneu Sindicalista*, ankaŭ kunlaboris en anarĥiistaj revuoj, ekzemple *Cultura Obrera* kaj anis en framasona Palma loĝio. En esperantaj medioj, li estis membro de Esperantista Klubo Palma kaj de SAT. La 9an de aŭgusto 1936 li estis kaptita kaj restis malliberita en la "Missió". La 6an de januaro, nokte, oni asertas, ke estis liberita, sed de tiam oni scias nenion pri li.

*Sebastià Crespi Valls* (Palma 1899-1936). Linidesegnisto. Li havis plurajn interesojn kaj estis amatora verkisto. Li partoprenis en la esperantista movado la jaro 1927 kaj 1928 prezidis la Esperantistan Klubon Palman. Poste li partoprenis en la fondado de la Grupo Esperantista Lumo. Politike li fondis la palman anaron de *Esquerra Republicana Balear* kaj prezidis ĝin. La 10an de oktobro 1936, policanoj kaptis lin en lia hejmo kaj la sekvan tagon, frumatene, lia korpo aperis en tombeja vojo, en lia kapo – kelkajn kuglojn.

*Joan Matas Soler* (Palma 1902-1936). Tajloro. Li loĝis en Santa Catalina kaj havis propran laborejon en strato Borseria, kie la faŝisma polico lin kaptis la 5an de novembro 1936. Kiel aliaj esperantistoj li havis plurajn interesojn: agis en la Ruĝa Kruco de Santa Catalina, en Ateneu Sindicalista kaj en la framasonaro, kie lia simbolnomo estis Zamenhof. Li multe laboris favore al la esperantismo; li estis vicprezidanto de la Esperantista Klubo Palma kaj aniĝis al SAT. Oni asertas, ke li estis murdita la 25an de novembro 1936.



*Josep Salom Nadal* (Pla de na Tesa, 1896-1936). Masonisto. Interesata en progresemaj ideoj, li agis en socialismaj kaj komunismaj medioj. En esperantujo li aliĝis al SAT kaj al Esperantista Klubo Palma. Vera artisto kaj kulturamatoro, en la Floraj Ludoj okazintaj en Palma la jaro 1925a li donis monpremion. Laŭ *Diccionari Vermell* li estis murdita la 8an de oktobro 1936..

## SANT CUGAT DEL VALLÈS

Komence de majo la tiea E-Grupo "Jozefo Anglès" informis pri nia lingvo en la loka mezlernejo *Angeleta Ferrer* antaŭ 100 gejunuloj, dum la Internacia Lingvo-Semajno. Krom la lokaj aktivuloj Trini Garcia, Jaume Deltell kaj J. Colom, kunlaboris samideanoj Güell el Barcelono kaj Guerrero el Hospitalet.
Oni invitis ilin junie fari saman prezenton en alia lernejo. Gratulon!

## VILANOVA I LA GELTRÚ

La 7an de julio sabaton vespere-nokte ekde la 19a h. okazos tie institucia populara festo laŭ la alloga nomo "Tots els colors del blau" (ĉiuj koloroj de la bluo). La loka E-Grupo disponos pri propra budo, kie krom informi pri nia lingvo, oni prezentos distrajn programerojn kaj en la ĉefa scenejo koncertos nia teamo "Kaj Tiel Plu". Partoprenos ankaŭ jenaj aliaj organizaĵoj: SOS Racisme, Comunitat Veneçolana, Club Piragüista Inuit, SARC, Av. Barri de Mar, Intermon, ACAPS, Acció Solidària Argentina, Mans Unides, Ajuda en Acció, Creu Roja, Casal d'Amistat amb Cuba.
Niaj membroj ricevos kompletan programon rekte de la organizantoj. Nia partopreno kaj kunlaboro nepre bezonatas.

## KEJ-REVUO

Aperis la unua numero (printempo 2001) de Interna-Cia Revuo de nia Junularo, kiu ampleksas 42 paĝojn, krom la kovrilon.
La prezento tekstas jene: "*Edito: Jen la unua numero de la informilo Interna-Cia Revuo (la antaŭa estis numero nulo) de KEJ. Bedaŭrante la prokraston, ni prezentas tiun numeron, kie vi povos trovi interesajn kaj amuzajn artikolojn, originalajn aŭ tradukitajn, el la tuta mondo. Pro tiu prokrasto oni ne enmetis artikolojn rilatitajn al KAFE kaj al la IJK, kiujn oni unue antaŭvidis enmeti. Finfine, do, plimulto de la artikoloj, kiujn oni proponis havas sian lokon en tiu revuo.*
*En tiu ĉi revuo oni jam povis enmeti kelkajn kunlaboraĵojn, sed la redakcio denove deziras sciigi al ĉiuj legantoj ke ili ĝojiĝus se ili sendus kunlaboraĵojn, ĉar tiu revuo celas, finfine, esti la voĉo de ĉiuj ge-KEJ-anoj* "
Ni aperigas ĝian indekson, por ke niaj legantoj informiĝu pri la enhavo, sed tamen ni volonte aperigus recenzojn sur nia venonta revuo. Kiu volontulo pretas?
Indekso
Programo de la produktivisma teamo (p. 1); Unua Parto: La taktiko de la Komunisma Internacio en la projekto de tezo prezentita de la itala K. P. en la 4a Monda Kongreso (Moskvo, novembro 1922) (p. 2); Futurisma fondo kaj Manifesto (p. 4); Dua oficiala lingvo en Japanio: por kio do? (p. 8); Dankado al Zamenhof (p. 10); Pri Budhismo (p. 11); Hispana naciismo nome de sennaciulo (p. 15); Faŝismo (p. 19); Pli pri lingvoj (p. 21); La Pola Ministro pri Edukado rekonis Esperanton (paĝ) 21); Protokolo de la Komitatkunveno (p. 22); "Goigs" al la kreanto (p. 30); "Lingva ĉielarko-ponto al kulturaj trezoroj" (p. 31); IJK 2001 en Strasburgo-Bonveniga teksto (p. 36); 5a Tutamerika Kongreso de E. (p. 38); Kalendaro 2001 (p. 41).

# INTERNACIE

**11a EŬROPA E-FORUMO**
Ĝi okazos inter la 14a kaj 19a de julio en Valencio pri la temo "Naturprotektado" en la tiea fakultato pri filologio. Krom la forumaj prelegoj, kulturaj vizitoj kaj muzikaj festivaloj kompletigas la programon. Aliĝiloj haveblaj en nia asocio.

**SEMINARIETO PRI E-MUZIK-KULTURO**
Ĝi okazos inter la 24a kaj la 29a de julio gvidata de Floreal Martorell, la motoro de Eurokka. La 26an de julio okazos festo honore al la Tago de la Esperanta Lingvo. Informiĝu ĉe: eurokka@esperanto.org.

**57a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO**
Ĝi okazos en Strasburgo (Francio) inter la 29a de julio kaj 5a de aŭgusto. Aliĝiloj haveblaj en nia asocio.

**ESPERANTO KAJ IDEOLOGIOJ**
*Kiel rolis kaj rolu la E-movado politike?* Prelegoj kaj debato okazos sabaton la 20an de oktobro en Gento (Belgio). Partoprenos: Kreŝimir Barkoviĉ, Detlev Blanke, Renato Corsetti, François Degoul, Alberto Fernández kaj Jan Superter. Pliaj informoj ĉe: http:// travel.to/studtago. Aliĝiloj haveblaj en nia asocio.

**PATAGONIA BULTENO**
De nun ĝi aperos nur trarete. Informiĝu pri la tiea movado ĉe legraveur@bariloche.com.ar.

**LETERVESPERU EN 2750-JARA SAMARKANDO**
Samarkandaj esperantistoj preparas internacian letervesperon okazontan aŭguste 2001, dediĉitan al la 10a jariĝo de la proklamo de la sendependeco de Respubliko Uzbekistano. Ĉiuspecaj tiutemaj materialoj (salutleteroj, reeĥoj, vojaĝimpresoj, nacilingvaj gazetartikoloj, libroj, turismaj broŝuroj, kantoj, poemoj, dokumentoj, fotoj, desegnaĵoj ktp. pri Uzbekistano, fakte ĉio ajn pri la temo (eĉ fotoj de vialandaj vendejoj, restoracioj kc. portantaj la nomojn "Samarkando", "Buĥara" ks!) estas TRE BONVENAJ KAJ ATENDATAJ. Koran antaŭdankon por via partopreno!.
Ĉiuj senditaĵoj estos eksponataj en la speciala muzea ekspozicio. La plej interesajn materialojn ni publikigos ankaŭ en nialanda nacilingva gazetaro. Krome, la plej aktivaj kontribuintoj ricevos specialajn uzbekiajn memoraĵojn, la noveldonitan esperantlingvan broŝuron *Samarkando por turistoj* kaj la unuan uzbeklingvan E-lernolibron (kun du vortaretoj kaj konversacilibreto utilaj ankaŭ por eksterlandanoj!).
Bonvolu adresi ĉion JAM NUN al: Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro; P.O. Box, 76; UZ-703000 SAMARKANDO (Respubliko Uzbekistano).
Retadreso por urĝaj kontaktoj: peacetur@samarkand.uz (mesaĝu en teksta formato!). TTT-paĝo: http://www.friends-partners.org/~ccsi/nisorgs/uzbek/peacemsm.htm.
Represo kaj nacilingvaj anonctradukoj dezirataj!

**EL POPOLA ĈINIO**
La populara revuo *El Popola Ĉinio* ne plu aperas papere, sed oni povas ĝin legi en la retejo http://www.chinareport.com.cn. La nova EPĈ estas enhavoriĉa kun diversaj rubrikoj, kiaj novaĵoj, kulturo, socio, Esperantujo, inter ni, homaro kaj naturo, turismo, ekonomio, scienco kaj tekniko, arto, kuirarto, sur nia librobreto ktp.
La distribua fako daŭre okupiĝas pri ties libroservo (katalogo havebla en nia asocio).

**BRAZILA ESPERANTISTO**

Ni ricevis la novaspektan tutkoloran revuon trimonatan de Brazila E-Ligo kun peto de peranteco, kiun ni principe akceptis. Grafike moderna, ĝi havas 34 paĝojn, kun formato 25 x 19 cm. Enhavo varia, ne nur movada. Venonte ni informos pri abonkotizo.

**INTERNACIA KUIRARTO**

La E-Grupo de la franca urbo Amiens "Grand Amiens Esperanto" invitas nin ĉiujn partopreni en la verkado de kuirreceptoj por eldoni libron. Ĉiu el la proponataj receptoj estos akompanata de klariga teksto pri ĝia historio kaj tradicio.
Sendu vian recepton al: Grand Amiens Esperanto; 6, rue des Fauvettes; FR-80330 CAGNY (Francio) aŭ rete al gae80@neuronnexion.fr.

**BOSNIA LILIO**

Ni ricevis 4an numeron de la gazeto de E-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, kun tre interesa kaj varia enhavo kaj 20 paĝoj en la kutima formato DIN A4.
Laŭ movada vidpunkto elstaras la informo pri la apero de la unua vortaro ambaŭdirekta kun ĉirkaŭ 4000 Esperantaj radikoj kaj 5000 kapvortoj en la bosna, kio helpos nuntempajn plej urĝajn bezonojn. Ankaŭ la novaĵo pri E-kursoj kun ŝtata subteno en 5 elementaj lernejoj estas esperiga por la normaligo de la tiea movado. Interese kaj plej grave estas ke ĉiujn kursojn gvidas tute nova, juna generacio de esperantistoj: Dzenita Zvirac, Vildan Delalic, Merima Tabaković kaj Selma Zvirac. Grandparte temas pri tiuj knabinoj, kiuj vizitis nin en 1996. Gratulon!
Laŭ humana vidpunkto elstaras la raporto pri la inaŭguro de la akvodukta sistemo en Klokotnica kun la partopreno de nia aktivulo Éric Collignon el Espero-Katalunio kaj membroj de Sant Quirze Solidari, kiuj decidis subteni novan projekton: ekipi per plej urĝaj medicinaj aparatoj la San-Domon en la sama Klokotnica. Ankaŭ la projekto realiĝos kunlabore kun Espero.
Pri la paca rekonstruo de Bosnio oni legas la artikolojn : *La vero kaj la repaciĝo* kaj *Internacia Forumo Bosnio*.
Tri literaturajn paĝojn ili dediĉas al la plej populara bosnia poeto vivanta, Izet Sarajlić, kiu prifestis du grandajn jubileojn: 50 jarojn de sia lirika verkado kaj sian 70an naskiĝdatrevenon.

**OMAĜO AL GASTON WARINGHIEN**

Okazos dimanĉon 9an de decembro 2001 en Aigné, urbeto proksima al la urbo Le Mans, 200 km for de Parizo. Matene, memoriga ceremonio en la tombejo de Aigné kun partopreno de la urbestraro; tagmanĝo en urba salono de Aigné; posttagmeze, kolokvo en la sama salono: kelkaj prelegistoj elvokos lian vivon kaj lian agadon en kaj ekster la Akademio; ekde la morgaŭo (de la 10a ĝis la 15a de decembro) staĝo okazos en la Kvinpetalo omaĝe al la vivo kaj verko de Waringhien. Por ĉia precizigo kaj aliĝo (aldonu respondkuponon) vi turnu al s-ino Jackie Huberdeau; Esperanto-Grupo de Maine; 33, rue François Cevert; F-72100 LE MANS (Francio).

**DEZIRAS KORESPONDI**

Denis Osorno, kolombia esperantisto 35-jara. Li volas interŝanĝi konojn pri kulturoj. Vegetarano kaj komercisto pri ŝuoj. Lia poŝta adreso: AA. 038; CO-FLORENCIA; Caqueta (Kolombio). Lia retadreso: denisoso@latinmail.com.

Raporto de Claude LONGUEEPEE claudel@worldonline.fr pri la Euroscola-Tago en Esperanto de la 8a de majo en Strasburgo.

MALFERMITA LETERO AL MIA AMIKO, KIU INSTRUAS EN GIMNAZIO, KIE LI STARIGIS ESPERANTO-KURSON, KAJ KIU ANKORAŬ NE SCIAS KIEL ALLOGI SIAJN LERNANTOJN AL PERSISTA LERNADO KAJ KIEL KONVINKI ILIAJN GEPATROJN.

Hodiaŭ estas la 10a de majo. Antaŭ du tagoj la "Euroscola-Tago" okazis en la Strasburga parlamentejo kun junuloj el la tuta Eŭropo, bazite sur la temo de la kampanjo "2001-jaro-de-la-lingvoj". De du tagoj, mi povas aserti, ke "Euroscola en Esperanto" ekzistas: tion mi ja scias... ĝin mi renkontis!. El pridubinda revo, ĝi fariĝis realaĵo konkreta kaj kontentiga.
Reveninte antaŭhieraŭ vespere el Strasburgo, kie mi vizitis la parlamentejon, kaj precipe la tieajn "Euroscola"-okazintaĵojn, mi ja estis kontenta, sed ankaŭ tre laca. Tamen mi kapablis legi kaj apreci la hodiaŭajn retmesaĝojn de Gilbert Stammbach, kiu raportas pri la tieaj eventoj de la 8a de majo. Mi alte taksas kaj tute aprobas tiun raporton, kiu certe necesis —kaj sufiĉas— por taŭge resumi la disvolviĝon de la manifestacio kaj la impresojn de ĝi vekitajn.
Tamen mi volas aldiri, ke mi speciale pagis mian vojaĝon al Strasburgo, ke mi ŝvitis en la salonoj kaj en la koridoroj de la parlamentejo, ke mi incitite duonmalsaniĝis pro iuj aŭditaĵoj kaj iuj parlamentaj misorganizitaĵoj, ke mi ĝojis diskuti kun multaj esperantistoj, ke mi konsideris min komisiita observanto de "Esperanto-France", kaj ke ĉio tio miaopinie ankaŭ min rajtigas diri kelkajn vortojn pri la "Afero Euroscola" kaj aparte pri la "Afero Euroscola en Esperanto".

**PRI LA ĴUSA SUKCESO DE "EUROSCOLA EN ESPERANTO"**
Tiu "Euroscola-Tago", por Esperanto kaj por la esperantistaro, estis sukceso. Kompreneble mi ne certas, ke la unutagaj kvazaŭaj debatoj de kelkaj elitaj junuloj profunde influos la pripensojn, la laborojn kaj la decidojn de la Eŭropa Parlamento aŭ de la Eŭropa Komisiono (kiuj cetere forestis el la loko). Sed ni ne forgesu, ke, dum tiu tago, "la pordoj estis malfermitaj" kaj ke fakte svarmis multaj vizitantoj. Tiel estis rimarkita Esperanto. En la koridoroj, en la laborsalonoj, en la debatamfiteatro, estis klare aŭdita Esperanto. Same estis priparolita kaj komentariita Esperanto. Kaj ne nur inter la muroj de la parlamentejo, sed ankaŭ ekstere, danke al intervjuoj, danke al ĵurnalaj artikoloj, danke al televidaj elsendoj. Kaj ne nur fare de la esperantistoj, s ed ankaŭ danke al aludoj de iuj partoprenantoj.
La tre bone organizita budo celanta al elmontrado de Esperanto, kaj la konvinkemaj deĵorantoj, certe tiom kiom la junulara Euroscola-manifestacio, efikis al tiu sukceso.
La baza fundamento de tiu dufonta sukceso estas nia samideano Gilbert Stammbach, kiu persiste kaj daŭre neflankiĝante batalis kontraŭ ĉiaj malfacilaĵoj, stumbligiloj kaj insidiloj. De Gilbert la obstineco venkis ĉiujn obstaklojn, malhelpojn kaj bremsadojn, kiuj estis starigitaj, unuflanke de l a parlamentaj oficistoj, interpretistoj kaj aliaj instancoj, sed ankaŭ aliflanke de la samideanaj dubemo (kaj mi mem elmontris je la komenco de la afero), malkomprenemo, timemo kaj mallaboremo...
Mi ne dubas, ke la junaj partoprenantoj tre feliĉas kaj fieras pri tiu "Granda Tago", de kiu ili kunportis amason da memoraĵoj. Mi ne dubas, ke ili estos fervore reklamantaj pri la afero kaj la intereso lerni Esperanton al siaj amikoj kaj samlernejanoj.

PRI LA NEPRA TUJA AGADO, POR EFIKA PLUVIVO DE "EUROSCOLA EN E SPERANTO"
Konsiderante la jaman traboran efikon de tiu unua guto, ni havas la nepran devon da ŭrigi niajn kampanjojn al "Euroscola en Esperanto". Unue pro la reklama efiko de la manifestacio mem, due pro la spuroj lasitaj en la junaj mensoj de la partoprenantoj.
(El Eŭropa Bulteno n-ro 13, majo 2001)